# NORDA GAZETO

DUMONATA BULTENO
DE LA
NORDFRANCA ESPERANTO-FEDERACIO

Redaktoro kaj responda eldonanto :
Lucien BOURGOIS,
25, Rue Gambetta
62 - NOYELLES-GODAULT, Tél. : 59

Kotizoj (kun bultenservo) :
a) Junuloj : 2 Fr.
b) Aktiva membreco : 3 Fr.
c) Subtenanto : 5 Fr.

Fédération Espérantiste du Nord de la France
17, Rue des Bouvreuils, 62 - ARRAS.
C.C.P. LILLE 517-15.

Generala Sekretario : Fernand DITACROUTE, 178, Chemin Castre, 62 - CALAIS.

Informilo n-ro 3 Majo-Junio-Julio 1966

## Raporto pri la Jara Federacia Kongreso - LILLE 8/5/66

Ĉeestis ĉ. 45, en la Festsalono, interalie kelkaj eksterlandanoj :
F-ino ORSOLINI, Prezidantino de la karolreĝa grupo kaj S-ro LOSTRIE el Bruselo (Belgujo), S-ro H.J. CLEYTON el Sheffield (Anglujo) kaj - komprenebIe - la Familio WEBER, niaj nederlandaj ... federacianoj.

Je la 10-a k. duono, S-ro ODENT, Federacia prezidanto, malfermis la kunsidon. Li senkulpigis S-rojn PHILIPPE, DOYELLE, BUERICK, BONVOISIN, DUCROCQ, LESOIN kaj Ges-rojn VAN PARYS.
S-ro DITACROUTE, Generala Sekretario, legis poste la agadraporton por la jaro 1965. Raporto unuvoĉe aprobita.
S-ro ODENT, anstataŭanta S-ron DOYELLE, kasiston detenatan pro malsaniĝo de filino, legas la financan raporton. Ankaŭ aprobita. Li akcentas pri tio, ke nia Federacio vivas dank' al la subvencioj. Nur per la kotizoj, la bulteno verŝajne mortus. Li do proponas, ke ekzistu fonduso por la propagando. Ĝi estos nutrata per la memvolaj mondonacoj de tiuj, kiuj temp'al'tempe pensos pri la bezonoj de la Federacio. Oni alvokos al nutrado de tiu fonduso dum la tuta jaro en "Norda Gazeto" kaj publikigos la donacojn.
Estas decidite, ke ni konservos la samajn kotizojn.

...

Pri servo de la bulteno, klarigas la Prezidanto : ĝi estas sendata al ĉiuj kotizintoj (listo A) kaj ankaŭ propagandcele kaj amikece al personoj, kiuj ne pagis sed estas konataj en la Federacio kaj ekstere (dua listo B). Se vi bezonas ekzemplerojn por amikoj, kiuj interesiĝas pri ĝia enhavo aŭ por la propagando, skribu al S-ro DITACROUTE, por ke la nomoj aperu sur la listo B.

La kunvenantaro poste voĉdonas por renovigi la trionon de niaj konsilantoj. S-ro VILHELM kaj F-ino JOUBERT ne plu estas kandidatoj. S-ino Van PARYS kaj S-ro BUERICK anstataŭas ilin, kiel grupestroj. S-roj AUGUEZ, BONVOISIN kaj BOURGOIS estas reelektitaj.

Nacia Kongreso de U.F.E. en AGEN : Ges-roj CURNELLE reprezentos nian Federacion.

Venontaj Federaciaj Renkontiĝoj : aŭtuna renkontiĝo en Valenciennes (verŝajne la 9-an de oktobro).
- En Lille, se eble la unuan dimanĉon de la Foiro (Aprilo 1967).
- En Kalezo, Pentekoste 1967. Tre verŝajne Nacia kaj Markola Kongreso.
- En Méricourt, junie aŭ poste, ĉar S-ro GILOTEAUX prave rimarkigas la proksimecon kun la kaleza kongreso, nepre evitindan.

Gazetara Servo : Raportas S-ro GILOTEAUX. Li bedaŭras, ke en Tourcoing la kluba vivo ne estas tre aktiva nuntempe. Sekve, la apero de artikoloj en la gazetaro estas limigita pro manko de novaĵoj.
La ĉeesto de federacianoj al Universala Kongreso estas interesa temo por artikoloj, kaj S-ro GILOTEAUX petas de Ges-roj LIGOT, kiuj ĉeestos en Budapesto, raporti pri ĝi post reveno.
Poste, li detale prezentas favorajn priesperantajn artikolojn, kiuj aperis en la ne-esperantista gazetaro (Auto-Journal, Revue des P-et-T, L'Elan, ktp.), pri radiostacioj, kiuj elsendas Esperante, pri la tre interesa televida elsendo pri Esperanto "Téléphilatélie" en Februaro.

Prospekta abona servo : Nun, respondas pri ĝi S-ro LEGRAND en ROUBAIX, 356, rue Ingres. Al li oni pagu la kotizojn por aboni al la prospektoj.

Diversaĵoj : S-ro GILOTEAUX alvokas la federaciajn grupojn :
- Ili nepre instigu la koncernajn turismoficejojn eldoni - se ne tuj tute en Esperanto - almenaŭ mallongan tekston en Esp-o, en la jam ekzistantaj prospektoj. Tio sukcese okazis en Roubaix-Tourcoing.
- En la suplemento de la Jarlibro aperis la listo de la lokaj grupoj. Ŝajnas, ke mankas kelkaj por Nord-Francujo. La grupoj estas invitataj klopodi, por ke la venonta listo estu kompleta.
- Ankaŭ SENPAGE oni povas registrigi la grupojn en la franca jarlibro "RAVET-ANCEAU".

Je la 12-a fermiĝis la kunsido. Dum la honorvino, kiu sekvis, S-ro PICAVET, per bonvenvortoj, oficiale akceptis la kongresanojn, nome de la foira Prezidanto, S-ro BOUCHERY.
Je la 12-a k duono, komenciĝis la bankedo. La tre bona menuo plaĉis al ĉiuj; kaj kompletigis la gajan etoson kantoj kaj rakontoj.
S-ro PICAVET regalis la partoprenantojn per la kutima glaseto da "Wambrechies" kaj rediris, tiuokaze, sian simpation por nia movado. Li laŭdegis nian laboron por la paco kaj deziris por la esperantista movado la Nobel-premion. S-ro ODENT kore dankrespondis al la "plej varma defendanto de nia idealo".
Je la 15-a, ĉiuj ĝisrevidis ĝis Valenciennes, proksimoktobre.

Fernand DITACROUTE.

AGADRAPORTO de la N.F.E.F. - Jaro 1965

## FEDERACIAJ MANIFESTACIOJ

En Méricourt, la 28-an de Marto, ĉ. 60 ĉeestis nian printempan renkontiĝon, organizitan de niaj geamikoj Van PARYS.

Okaze de nia jarkongreso, la 9-an de Majo, en la kadro de la Internacia Foiro de Komuna Merkato, estis prezentita la filmo "Angoroj". Ĉ. 120 ĉeestis. Konstanta Esperanto-Budo funkciis dum la tuta foira daŭro.

Nia tria manifestacio por la jaro okazis en Amiens. 60 partoprenis tiun aŭtunan renkontiĝon.

## MARKOLA KONGRESO

La 4-a Markola Kongreso okazis en la kadro de la Nacia Belga Kongreso, en Ostendo, Pentekoste. 200 esperantistoj el 10 landoj ĝin partoprenis.

## NIAJ FEDERACIANOJ VOJAĜAS EKSTERLANDEN

La loka grupo en Méricourt, "Frateco per Esperanto" organizis peraŭtobusajn ekskursojn al Walcheren-insulo (Nederlando).

Por F-ino HARDELIN, membrino de la Grupo de Valenciennes, la rondvojaĝo, kiun ŝi entreprenis kun amikino dank' al premio de la Rotary-Klubo, finiĝis ĉe hospitalo. Ŝi intencis viziti 13 eŭropajn landojn. Tamen, laloka loĝantaro decidis rezervi al ŝi varman akcepton ĉe la reveno.

## LOKAJ MANIFESTACIOJ

Roubaix-Tourcoing - Ĉe la Kultura Centro okazis debato pri la esperantista gazetaro, kiu jam havas ĉ. unu milionon da legantoj en la tuta mondo.

La klubo ankaŭ aranĝis projekciadon per koloraj diapozitivoj en Novembro kaj jarfinan festkunvenon ĉe S-ro LEGRAND, en Roubaix.

Valenciennes - Kiel ĉiujare, okazis la ĝemelrilatoj kun Düren. La lokaj esperantistoj vizitis siajn kolegojn el Trans-Rejno.

La klubo ricevis salutkarton esperantlingvan de la nova prezidanto de Aŭstruja Respubliko, S-ro Franz JONAS.

Brêmes-les-Ardres - Okaze de la rehejmiĝo de nia simpatia dana membro, S-ro SKOLE, okazis intima adiaŭa renkontiĝo, la 19-an de septembro, en ĉeesto de la komitatanoj de la Kaleza Kultura Centro Esperanto.

PROPONO AL UNO - Multan sukceson ĝi renkontis en la federacio. Subskribis, inter aliaj :

En Arras : la urbestro, S-ro Guy MOLLET, eks-Ĉefministro.

En Bourbourg : la urbestro.

En Calais : S-ro Vendroux, Deputito - Urbestro kaj Vicprezidanto de la Eŭropa Parlamento.

En Hénin-Liétard : S-ro Fernand DARCHICOURT, Deputito-Urbestro; S-ro PANTIGNY, beletra kritikisto; la estraro de la Laika Amikaro, nome de tiu Asocio (1274 membroj); la tuta instruistaro de la Ĝeneralkleriga Kolegio Sadi-CARNOT; instruistoj el la lernejaroj Fallières, Darcy, Michelet, Pantigny; kaj magistratanoj.

En Noyelles-Godault : S-ro Louis BEUGNET, Urbestro, eks-Deputito; 14 geinstruistoj; kaj 5 seminarianoj.

En Méricourt : La Urbestro, S-ro Hotte kaj la Laika Amikaro (700 membroj).

En Roubaix-Tourcoing : ĝis la 10-9-65 sume 210 kolektivaj kaj 80 individuaj subskriboj. La urbestro ankaŭ subskribis, same kiel en Croix.

En Valenciennes : la loka Esperanto-Klubo kolektis 119 subskribojn. (1)

Gratulojn al ĉiuj agemaj grupoj kaj unuopuloj pro tiu fruktodona kolektado!

## LA JUNULARO

Nun ekzistas interne de la Federacio sekcio de junuloj. Aperos en nia bulteno paĝo pritraktanta la junularajn temojn. Konsentis preni sur sin la taskon ekmovigi ĝin S-ro Alain OUTREMAN, el Longuenesse.

## NACIA KONGRESO

Ĝi okazis en LE HAVRE. Reprezentis la Federacion S-ro CONTARD.

## INSTRUADO

En Arras, komence de decembro, S-ro ODENT malfermis kurson por komencantoj ĉe la Porinstruista Seminario. Oficiale ekzistas Esperanto-Rondo en la kadro de "Foyer des Normaliens".

En Valenciennes : kun permeso de la lerneja inspektoro kaj konsento de la gepatroj de la lernantinoj, S-ino LIGOT instruas Esperanton al 24 knabinoj.

En Calais : F-ino Danielle CLUZET sukcesis ĉe la "Atesto pri Lernado" en Lille kaj ĉe "Supera Atesto" en GRÉSILLON. Ŝi lernis Esperanton aŭtodidakte.

## GAZETARA SERVO

Multaj priesperantaj artikoloj aperis en la regiona gazetaro :

- En la Voix du Nord : pri la filmo "Angoroj", kun foto de S-ino Iana RAVSELY.

4 ĵurnaloj el Roubaix-Tourcoing aperigis sume 10 artikolojn pri la Universala Kongreso en TOKIO.

- Nia amiko, S-ro BORDESSOULLE, el Berck ĉe Maro, aperigis en "Journal de Montreuil" varbartikolon pri Esperanto.
- En Calais, Nord-Littoral aperigis multajn artikolojn verkitajn de la grupa sekretario, S-ro BONVOISIN, kaj ankaŭ de la ĵurnalisto, S-ro FERMON, kiu estas tre favora al nia Movado kaj aliĝis al la Kaleza Kultura Centro Esperanto.

Fernand DITACROUTE,
Ĝenerala Sekretario.

(1) N.D.L.R. : Al tiu honortabelo de la poresperantaj batalantoj, ni aldonu DOUCHY-les-MINES, kun subskriboj de 22 instruistinoj.

## RADIO

Merkredon, 25-an de Majo, en la elsendo "Bonan Tagon, Via Urbestra Moŝto", la radiostacio "Eŭropo n-ro 1" prezentis BAUGÉ, la Ĉefurbon de la Francaj Esperantistoj.

## N I A V I V O :

Valenciennes : Okaze de la sepa datreveno de la ĝemeliĝo Valenciennes-Düren, delegitaro el ok esperantistoj el Düren (Fed. Respubliko Germanujo), gvidata de S-roj JODOZY, vic-Prezidanto kaj SCHIFFER, Sekretario, vizitis siajn kolegojn el Valenciennes, sabate 21-an de Majo.

Vespere, okazis laborkunsido en la sidejo, Kafejo L'Escargot, en ĉeesto de S-ro LIGOT, loka Prezidanto kun edzino; S-roj CANONNE, Vicprezidanto; GAUDOUX, Kasisto; DIETRICH, Sekretario, kaj de SMET, Oficiala Delegito de Balga Esperantista Ligo.

Ges-roj LIGOT, S-roj ROUZE - patro kaj filo - sciigis, ke ili intencas partopreni en la U.K. de U.E.A. en Budapesto. Survoje, ili rendevuos kun kvin esperantistoj el Düren, kiuj vojaĝos kun ili ĝis la hungara kongresurbo.

Revene, niaj samfederacianoj veturigos tri Bulgarojn, kiujn ili gastigos dum du semajnoj.

Fine de septembro, du junaj japanaj studentoj ankaŭ gastos en Valenciennes. Ambaŭ apartenas al la religia organizaĵo "OOMOTO", kiu elektis Esperanton, kiel esprimlingvon.

En oktobro okazos en Valenciennes federacia renkontiĝo de N.F.E.F.; kaj, en ĝia kadro, espereble, junulara kongreseto.

Post tiu kunveno, kelktrideko da esperantistoj kunvenis ĉe la sidejo kaj finis tiun vesperon en gaja etoso.

La morgaŭan dimanĉon, alia bankedo okazis ĉe restoracio "du Viaduc", ĉe Placo de Tournai.

Posttagmeze, la Valencienanoj akompanis siajn gastojn ĝis la belga landlimo

En 1967 okazos reciproka vizito.

La tuta regiona gazetaro detale raportis kun foto.

N.D.L.R. : Brave al niaj agemaj membroj el Valenciennes pro ilia bonega propagando kaj fruktedona laboro!

## N E K R O L O G O

Henri MICARD - La 19-an de Majo, en la aĝo de 69 jaroj, forlasis nin Henri MICARD, Prezidanto-Fondinto de la Kultura Esperanto-Domo Grésillon en BAUGÉ. Li mortis post longa doloriga malsano; kaj tre multaj geamikoj akompanis lian familion al la tombejo de EPINEUX-LE-SEGUIN.

Nesuperebla gvidanto kaj animanto, tiu agemulo kun spirito klara, saĝa, kun nobla koro, dotita per tre vigla kuraĝo, senŝanceliĝe laboradis por idealo de paco kaj internacia interkompreniĝo.

Ĝismedola esperantisto, admirinde helpata de sia edzino, li dediĉis sian plej bonan forton por la propagando de Esperanto.

Lia morto estas nemezurebla perdo por la esperantista movado.

# DE MAUPERTUIS ĜIS ZAMENHOF.

Nur post pluraj centjaroj de provhezitoj k eksperimentoj la lingvistiko sukcesis malkovri la ĝeneralajn principojn, sur kiuj estas bazita la konstruado de internacia lingvo.

Same kiel ĉiuj homaj elpensaĵoj, la kreado de tiu lingvo montriĝis malrapida k iompostioma entrepreno, kiun oni ŝuldas al la senlaca persistemo de la pioniroj k iniciatintoj. Jam eminentaj pensuloj estis pripensintaj k eksperimentintaj ĉiujn eblajn rimedojn por solvi la problemon. Atenta ekzameno de iliaj laboroj pruvas, ke ek de la XVIII-a jarcento oni kapablis distingi la lingvistikajn leĝojn, sur kiuj devis tute nature baziĝi la ĉefprincipoj de internacia lingvo.

Sed la nesufiĉa diskonigo de la laboroj de la kleruloj, kiuj traktis tiun demandon, k la malfacilaĵoj propraj al la tiam embria lingvistiko, kies nivelo malsuperis tiun de la aliaj sciencoj, longe malhelpis la serĉistojn krei frue antaŭ ZAMENHOF la helplingvon, kiun lia genio poste disponigis al la homoj.

Ĉefe inter esperantistoj, jeno indus pli vastan diskonigon : MAUPERTUIS majstre difinis la donitaĵojn de la helplingva problemo. Jam en 1756, li indikis la solan eblan solvon : tiu, kiun ZAMENHOF konkretigis en 1887, t.e. : 131 jarojn poste. Efektive, jen kion esprimas MAUPERTUIS en sia verko "Disertacio pri la diversaj rimedoj uzataj de la homoj por esprimi siajn ideojn" (el verkoj de MAUPERTUIS, Liono 1756; volume III, paĝoj 467 k 468) :

"Se ĉiuj substantivoj havus unu saman finaĵon nevarian; se nur la nombro k la kazo (ĉar la genro ja estas neutila) estus signitaj per kelkaj ĉiam samaj artikoloj, anstataŭ deklinacioj; se oni donus nevarian finiĝon al ĉiuj adjektivoj, alian al la adverboj; se ĉiuj verboj sammaniere finiĝantaj havus nur unu infinitivon, modifotan per adverboj, kiuj indikus la modojn k tempojn laŭ unuforma k ĝenerala maniero; nu! se ekzistus tia lingvo, ĉiuj gramatikaj reguloj, tiel multnombraj k komplikaj, malpliiĝus ĝis preskaŭ nenio; ĉiuj vortoj, kies specon signus la finaĵo, estus facile lerneblaj; aŭ trovitaj en vortaro, iu estus ĉiam tute facile uzataj, ĉu por klarigi, ĉu por kompreni. Nedubeble, tia lingvo estus nekompareble pli facila, ol ĉiuj niaj. Per la unuhora lernado de la malmultaj reguloj k bona vortaro, oni kapablus perfekte kompreni ĉion skribotan en tiu lingvo, k skribi ĉion komunikotan de ni al aliaj."

Per Volapuko, Pastro SCHLEYER sukcesis verki gramatikon, ŝajne mirindan, kompare kun tiuj de la naciaj lingvoj. Sed la funda eraro de Volapuko kuŝis en ĝia vortprovizo, tro artefarita. Ĝenerale, la vortoj k radikoj estis tute forĝitaj de SCHLEYER. La cerboj ne sukcesis ilin asimili.

Claude VERNAY.

Elfrancigis : Lucien BOURGOIS.

Bulteno ofsete presita de Centre National Espéranto-Office,
9 Bis, Rue du Commandant-de-Poli, 45 - ORLÉANS.

Le Gérant responsable :
Lucien BOURGOIS, 25, Rue Gambetta, 62 - NOYELLES-GODAULT.